


KIANTO

numero 139 (1994:1)

- 
- Kial 1994 estas la jaro de la hundo?
 - Boško kaj Admira: la novaj Romeo kaj Julieta el Sarajevo
 - La satanaj proverboj de Bernard Golden
 - Konatiĝu kun *martenika*
 - Kio povas okazi, kiam reĝido estas tro afabla?

LA TABUA MANGAĴO

1994: La jaro de la hundo	Sabira Ståhlberg, Germanio	2
La tabua manĝaĵo	François Monet, Francio	4
La angulo de Ludmila kaj Petro	Ludmila kaj Piotr Malicczy, Pollando	6
Krucvorto (konkurso)	Sfinksido, Francio	7
Kune por ĉiam	Zoran Ĉirić, Serbio	7
La plej granda monbileto	Zoran Ĉirić, Serbio	7
Satanaj proverboj (1-a parto)	Bernard Golden, Hungario	8
Kio estas <i>martenika</i> ?	Bojana Prodanova, Bulgario	8
Vivu li! Vivu li! Vivu li!	Claude Piron, Svislando	10
El la vivo de Nasreddin Hoca	Sabira Ståhlberg, Germanio	12
Lalande (6-a parto)	Flávio M. Carneiro, Brazilo	13
En la cellulo / La fuĝulo	Georgo Kamaĉo, Hispanio	14
Tentaklo		15
La laktovendisto	Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo	15

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 139 (1994:1), 31a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
☎ +31 10 436 10 44;
✉ fakso +31 10 436 17 51
e-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Felip Artero i Lozano (Hispanio)

Martin Burkert (Germanio)

Flávio Martins Carneiro (Brazilo)

Zoran Ĉirić (Serbio)

Alberto García Fumero (Kubo)

Bernard Golden (Hungario)

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Ludmila kaj Piotr Malicczy (Pollando)

Remigiusz Mielcarek (Kanado)

Oshó-Davies Olúwàbúnmi (Niĝerio)

Claude Piron (Svislando)

Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)

Izabel Santiago (Nederlando)

Jozef Truong (Usono)

Ilkka Santtila (Finnlando)

Sabira Ståhlberg (Germanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkitaĵoj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anoncarifto:

Tutpaĝa 675 gld., Duonpaĝa 375 gld.,
Kvaronpaĝa 205 gld., Sesonpaĝa 155
gld. Okonpaĝa 110 gld. Eksterakviritaj
anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe
ripetita anonco (ne anonceto!) en
sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de
20%. Por movadaj instancoj: 50%
rabato. Varbantoj de ekstermovadaj
anoncoj ricevas maklerajon de 30% el
la prezo de la koncerna anonco. La
abontarifoj varias laŭlande. Petu
informojn de la supra adreso.



enkonduko


Kiam tiu ĉi numero trafos vin, mi estos sunumanta en Sudameriko. Nu, kial mi parolas pri intimaĵoj? Ĉar same kiel mi sunon, KONTAKTO bezonas vin. Sendu finfine tiun interesan kunlaboraĵon, kiun vi delonge planas kaj ne rezignu partopreni niajn konkursojn. Aŭ reagu al TENTAKLO. Aŭ sciigu al la tuta mondo pri via projekto aŭ salutu iun okaze de io kroĉanta anonceton sur nian anonc-tabulon. Kaj ne forgesu, ke lige kun la temo de la 50-a IJK en Ch'onan, nia rubriko SPECIALE atendas artikolojn pri moroj aŭ propraĵoj el via lando aŭ regiono.

Jam diversaj aŭdigis sian deziron, ke ni komencu publikigi lingvan rubrikon. Se vi samopinias, ekpafu viajn unuajn dubojn! Kompetentulo por prizorgi tian kolumnon estas serĉata.

Ĉi-numere aparte frandru Lalande, ĉar ja temas pri ĝia antaŭlasta ĉapitro. Nasreddin, kiu venis al ni tradukita rekte el la turka, adiaŭas – aŭ almenaŭ ĝisas – nin per Ĉiela prizorgado, pli poema ol ŝerca. Bonan legadon kaj elkoran bonvenon al ĉiuj novaj abonantoj!

Franjo

1994: La jaro



*Hundo?
Kial 1994
estu la jaro
de la hundo?*

Laŭ la ĉina tradicio ĉiun jaron karakterizas unu besto. Ekzistas entute dek du bestoj, nome la rato, taŭro, tigo, leporo, drako, serpento, ĉevalo, kapro, simio, koko, hundo kaj porko. Tiuj bestoj ĉiuj regas po unu jaron. Kiam la vico de bestoj finiĝas, oni rekomencas la kalkuladon.

Estus tre facile fini la priskribon ĉi tie pri la jarokalkulado, sed tiam ni scius nur kelkajn teknikajn detalojn. Estas pli komplike ol tio: la besto, kies tempo estas, profunde influas la tutan jaron. Ekzemple en politiko, socia vivo kaj aliaj aspektoj oni povas vidi, ke la karakterizaĵoj de la besto tre klare stampas la okazaĵojn dum la jaro. Krome, la besto, kies jaro estis kiam vi naskiĝis, karakterizas ankaŭ vin: vian vivon, viajn rilatojn, karakteron, geedziĝon kaj eĉ vian sorton!

Ekzistas klasika rakonto pri la ekesto de la tradicio en antikvaj tempoj. Budho, la reganto de la okcidenta paradizo en la popola kredo de la ĉinoj, decidis iam, ke oni bezonas kalkuli la jarojn laŭ iu inteligenta metodo. Pro tio li kunvokis la bestojn al sia paradizo, por ke ĉiu besto ricevu propran jaron. La bestoj ekvagis al Budho, sciante, ke laŭ alvenordo ili ricevos sian jaron. La rato, kiu estis tre inteligenta, volis esti la unua, kaj ruze demandis la taŭron, ĉu li povus sidi sur lia dorso survoje. Kiam ili aperis antaŭ Budho, la rato tuj kuris al la piedoj de Budho kaj do estis la unua. La porko venis la lasta, kaj do ricevis la lastan jaron, la dekduan.



de la hundo

Sabira Ståhlberg, Germanio

狗年大吉



BESTO-JARA TABELO*

Rato	1900	1912	1924	1936	1948	1960	1972	1984	1996
Taŭro	1901	1913	1925	1937	1949	1961	1973	1985	1997
Tigro	1902	1914	1926	1938	1950	1962	1974	1986	1998
Leporo	1903	1915	1927	1939	1951	1963	1975	1987	1999
Drako	1904	1916	1928	1940	1952	1964	1976	1988	2000
Serpento	1905	1917	1929	1941	1953	1965	1977	1989	2001
Ĉevalo	1906	1918	1930	1942	1954	1966	1978	1990	2002
Kapro	1907	1919	1931	1943	1955	1967	1979	1991	2003
Simio	1908	1920	1932	1944	1956	1968	1980	1992	2004
Koko	1909	1921	1933	1945	1957	1969	1981	1993	2005
Hundo	1910	1922	1934	1946	1958	1970	1982	1994	2006
Porko	1911	1923	1935	1947	1959	1971	1983	1995	2007

*Laŭ la luna jaro, kiu kutime komenciĝas iam inter la lasta semajno de januaro kaj la dua semajno de februaro en la okcidenta kalendaro.



La rato do estas inteligenta, rapidmova, ruza kaj aventurema, ankaŭ sekse. Post li venas la trankvila laboranto, la pacienca taŭro, kiu lasis sin superruzi de la rato. La taŭron sekvas la forta

kaj ribelema tigro, agresema kaj respektata, post kiu denove venas pli sobra kaj ĉiam elturniĝanta

leporo, kiu aprezas la hejmon kaj socian vivon. Tuj poste aperas la drako, idealisma, ĉiopova kaj... sukcesa en ĉio! Tial ĉinoj ofte deziras, ke iliaj infanoj naskiĝu ĝuste en tiu ĉi jaro.

La serpento, sekva en la vico, estas bela kaj saĝa, romantikema kaj ŝatas filozofi, sed flirtas kaj ĉarmas. En la ĉina tradicio oni diras, ke prefere oni fuĝu de la serpento, ĉar neniu povas ĝin rezisti. Pri la ĉevalo tamen ne estas tiel, sed oni nepre ne kolerigu ĝin... Krome la ĉevalo estas sportema, bonaspekta, egoisma kaj sendependa.



La rato do estas eleganta. Ĝi scias ankaŭ bone kondukti sed estas, laŭ sia nomo, tre kaprica. Neniam ĝi kulpas!

Kaj kio pri la simio? En Ĉinio la simio estas maliceta, ŝercema kaj elpensema. Ĝi amuziĝas pro ĉiu kaj ĉio, foje ludante, foje per ŝercoj (ankaŭ konkretaj), tiel ke apenaŭ eblas fidi ĝin. Ĝia kontrasto estas la koko, kiu aspektas tre agresema, plejparte pro tio, ke ĝi estas honesta kaj havas firmajn opiniojn, sen ajna konsidero al sentoj. La koko krome estas tre sinmontrema, ja ĝi estas la ĉefo. Kaj tiu, kiu ne agnoskas tion, prefere atentu.



Kia do estas hundo, ĉar ties jaro ja ĵus komenciĝis? Homoj, kiuj naskiĝis en la jaro de la hundo, kutime havas tre fortan senton pri justeco kaj defendemon. "Hundoj" estas ĉiam gardantaj kaj atentaj, sed povas ankaŭ esti cinikaj kaj tro zorgemaj. Tamen, ili estas tre lojalaj kaj honestaj, kvankam pesimismaj kaj malofte elmontras sentojn. Eble vi konas iun tian homon en via ĉirkaŭaĵo? Kontrolu ĉu li aŭ ŝi naskiĝis en, ekzemple, 1982 aŭ 1970, aŭ dek du jarojn pli frue...




La jaron de la hundo karakterizas politikaj agoj grandaj, sed en pli libera direkto ol ekzemple dum la jaro de la koko, 1993, kiam paradoj kaj militaj agoj abundis. La jaro de la hundo tamen entenas riskon pri troa idealismo, kaj povas okazi revolucioj; do la mondo daŭre ne estas en paco, sed la politiko pluiras varma, kaj ne trankviliĝas ĝis la porka jaro (1995)... Porko estas fidindaj sed kredas tre forte, kion diras aliaj. Porkoj estas ankaŭ plenaj pacigemuloj; dum la porka jaro ne videblas multe da militaj paradoj...

Ofte oni nomas tiujn ĉi bestojn "horoskopo", sed kiel vi jam konstatas, ili estas multe pli ol tio, ĉar ili ja influas tutajn jarojn. Krome, ne ĉiuj "hundoj" estas samaj, aŭ eĉ similaj inter si, kvankam similaj elementoj povas ekzisti en diversaj el ili. La karakteron de la homo influas ankaŭ multaj aliaj aferoj – kaj tiel ja ĉiu el ni estas unika!

Jen la ĉefverko!

Jen la ĉefverko!



Pli ol
3200
eroj sur
160 paĝoj

La katalogo estas sendita senpage al la regulaj klientoj de la Libroservo de UEA. Ĉiuj aliaj povas aĉeti ĝin por la prezo de 9 gld. Triona rabato ekde 3 ekz. Aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 5 gld.) kaj por la klientoj en la Eŭropa Unio 6% por imposto.

Tiu ĉi enkonduka rakonto estas historie dokumentita, kaj certe ne sola rakonto pri kanibalismo en la Pacifika regiono. Estas ankaŭ historia fakto, ke en Papua Nov-Gvineo multaj ankoraŭ en tiu ĉi jarcento estis kaj estas hommanĝantoj. Klasikaj jam estas la rakontoj pri misiistoj, kiuj finis sian vivon en la potoj de la indiĝenoj...

Kanibalismo, preskaŭ mortinta fenomeno en la 1990-aj, evidente tamen tre fascinas la nuntempon: en pluraj filmoj de la lastaj jaroj okazas intenca kaj neintenca hommanĝado (ekzemple en *Kiam la ŝafidoj silentas*, *Drakulo*, *Frititaj verdaj tomatoj*, *Manĝu la riĉulojn!* *La delikataĵo* kaj *La kuiristo, la ŝtelisto, lia edzino kaj ŝia amanto*). En la vespera gazetaro oni plej ŝokas per veraj rakontoj pri krimuloj, kiuj manĝis siajn viktimojn. En Francio ekzemple, iu japano manĝis iom da sia nederlanda koramikino, kaj metis la reston en la frostujon, antaŭ nur kelkaj jaroj. Nuntempe li ĉirkaŭvojaĝas la mondon rakontante pri hommanĝado al plenŝtopitaj prelegejoj. Krome rilate al Bosnio cirkulas onidiroj pri hommanĝado en la regiono, kvankam nenio estas pruvita, kompreneble.

Kial do ni tiom interesiĝas pri kanibalismo? Ĉu estas iu fascino pri la mistero, aŭ ĉu ni simple deziras sperti malvarman ekstremon ĉe la spino por samtempaj abomeno kaj hororo?

Kanibalismo hodiaŭ

Hodiaŭ kanibalismo estas science rigardata el du ĉefaj vidpunktoj. Unu estas la antropologia, kiu vidas kanibalismen kiel ritan aŭ tradician fenomenon, kvankam ĝia origino estas pridisputata: Ĉu estas tiel ke la homo origine, kiel certaj simioj (ekz. ĉimpanzoj manĝas simiojn de aliaj specoj), manĝas aliajn homojn, aŭ ĉu temas pri rito, kiu originas de iu kredo?

Ekzemploj pri rita kanibalismo bazita sur kredo: En Pacifiko ekzistis tute ĝeneralaj kutimoj, ke oni devas manĝi partojn de sia heroa malamiko por havigi al si ties forton. Simila kutimo ekzistis en Mongolio ankoraŭ en la 1920-aj, kaj en diversaj partoj de Afriko. Bazita sur alia kredo estis la tradicio, ke edzino devas manĝi partojn de la penisso de sia mortinta edzo en Papua Nov-Gvineo. En la tuta Pacifika regiono oni cetere manĝis siajn (mortintajn) parencojn, pro kredo je pra-ava forto, kiu povus transdoniĝi al la vivantaj homoj.

Tiuj kredoj estas laŭorigine nekonataj, sed estas fakto, ke en pluraj socioj oni kredis, ke brava homo aŭ praulo povus transdoni sian bravecon al la manĝanto. El Mongolio fontas historioj pri herooj, kiuj fortranĉis la koron aŭ hepaton de siaj ankoraŭ vivantaj malamikoj, por sorbi ilian kuraĝon kaj iĝi eĉ pli heroaj.

La aztekoj en Ameriko siaflanke faris alispecan, sed ankaŭ ritan hommanĝadon: ili oferis homojn al la dioj, kaj poste formanĝis la viktimojn nome de la dioj. Estas konate, ke similajn aferojn faras hodiaŭ kelkaj satanismaj sektoj i.a. en Usono, eble ĉefe por iel fortigi sian internan grupon: tiuj, kiuj komune manĝis homan viandon, nome rompis la plej grandan tabuon de la homaro, estas ligitaj al io horora kaj sekreta, kaj do ne tiom facile foriros de la grupo... En jam historiaj tempoj la venkintoj kutimis trinki el la kranio de malamikoj, kaj pri la

LA TABUA MANGAĴO


François Monet, Francio



... Kiam James Cook vojaĝis tra Pacifiko en la 1770-aj, liaj maristoj volis komerci kun kelkaj loĝantoj de insulo ie en Polinezio por havigi al si akvon kaj mangaĵojn. Tri-kvar maristoj foriris, sed ne revenis. La aliaj mal-trankviliĝis, kaj sendis dekon da maristoj al la insulo por serĉi la antaŭajn. La grupo venis al vilaĝo, kie oni preparis feston. Ili ĉirkaŭrigardis, kaj vidis pecojn de vestaĵoj, amason da viando, kaj orelojn. Iu rekonis orelingon de kamarado, kaj tiam ili ĉiuj ekkomprenis: iliaj amikoj estis distranĉitaj kaj manĝotaj, do ili rapidis reen al la ŝipo, fuĝante de atako fare de la insulanoj, kiuj deziris pli da viando por sia festo...

malnovaj grekoj oni rakontas en legendoj pri gepatroj, kiuj manĝis siajn infanojn, ofte nesciante, kion ili manĝas.

En Ĉinio ekzistis ĝis almenaŭ niaj tempoj (kaj verŝajne ankoraŭ ekzistas!) sufiĉe nekonata kanibalismo, kiun oni povus nomi pli medicina ol rita: manĝado de homo pro ties korpo, kiu estas utiligata kiel medikamento. Ekzemple manĝado de okuloj de ankoraŭ vivanta homo povas helpi kontraŭ okulmalsanoj, laŭ malnova ĉina recepto. Sed kanibalismo en Ĉinio havas ankaŭ hodiaŭ komercan flankon: en la komenco de la 1990-aj en la Sichuan-provinco gastejestro estis ekzekutita pro tio, ke li malkaŝe vendis pasteĉojn kun homa viando. Kaj aparte frandindaj estis infanoj, kaj homaj cerboj, dum la kultura revolucio en suda Ĉinio (vidu sube): maljunuloj kutimis veni al ekzekuto, kaj poste elsuĉi la cerbon de la ekzekutito, pli-malpli same kiel ni hodiaŭ frandas jogurton.






Supre: Eŭropa artisto de la 16-a jarcento imagis tiel la scenon de oftaj raportoj venantaj el Sudameriko pri hommanĝado.

Supre dekstre: Ne ĉiuj blankulaj aventuremuloj en Pacifiko estis tiel bonŝancaj kiel tiu ĉi en Papua Nov-Gvineo.

Dekstre: Tiel la esperanta Originala Bildvortaro bildigas pri kanibalismo. Ne tute nova sceno, ne tute for de la realo.

Sube maldekstre: Jen veraj kanibaloj el la nuntempa Pacifiko. Kiu diris, ke ili ne plu ekzistas?

Sube dekstre: estas konate, ke diversaj nuntempaj satanismaj sektoj praktikas kanibalismen.



Laste, necesas aldoni la ritan kanibalismen de la kristanoj: pluraj antropologoj vidas paralelojn inter vera hommanĝado kaj la simbola manĝado de la korpo de Jesuo dum la komunio.

Histerio kaj hommanĝado

La alia, malpli klare difinebla vidpunkto pri kanibalismo estas la t.e. kriza, amashisteria: kiam okazas granda socia krizo, ekzemple revolucio aŭ milito, aŭ la vivo de grupo estas minacata de malsato aŭ aliel en la risko pere, oni manĝas homojn. Sed ekzistas pliaj flankoj pri tio: okazis ekzemple en Francio en 1870, ke vilaĝanoj manĝis iun nobelon pro neklaraj kialoj. Iuj diris, ke li estis revoluciulo, aliaj, ke li simple kolerigis iujn homojn, sed estas tute klare, ke temis pri pura amashisterio dum kiu iu devis iĝi la viktimo.

Siaflanke, Britio faris jam en la 18-a jarcento krizo-leĝon, kiu difinis, kiam oni rajtas manĝi homan viandon. Nur pro granda krizo kaj se oni lotumis laŭleĝe, kiu iĝu la plado por la malsatantoj, estis en ordo manĝi homon. Tio koncernis ĉefe maristojn. Kaj efektive, plejmulto kiu "obeis" la leĝon estis maristoj, kiuj en katastrofaj situacioj devis engluti siajn kamaradojn. Dum la mondmilitoj okazis kriza hommanĝado ankaŭ en Eŭropo kaj en Proksima Oriento, kie la manĝantoj estis soldatoj.



Cetere, en Ĉinio oni manĝis homojn dum jarcentoj, kaj pri tio ekzistas pluraj pruvoj en historiaj libroj. Eĉ generaloj kaj aliaj respektataj personoj instigis al manĝado de homoj, ĉefe al manĝado de malamikoj. En pluraj gazetoj de Usono, Nederlando kaj Svedio oni dum 1992

skribis plurajn artikolojn pri kanibalismo en Ĉinio, kaj ankaŭ menciis, ke ĉinoj havas longan tradicion pri kanibalismo. Tio rereflektiĝis en la

pasinta jarcento, kiam ĉinoj kredis, ke la eŭropaj misiistoj manĝas infanojn. La plej freŝa ekzemplo pri kriza kanibalismo en Ĉinio: dum la kultura revolucio (fine de la 1960-aj kaj komence de la 1970-aj jaroj), ĝuste pro tradicio kaj ideologio (ambaŭ kun la celo manĝi malamikojn), oni forvoris homojn en la suda provinco Guangxi. Tie kanibalismo devenis de kolektiva perforto, histerio kaj teruro, kiuj havis fonon en la historiaj tempoj kaj en la ideologio, kiu diris, ke oni per ajna metodo seniĝu je klasmalamikoj. Kiel siatempe en Francio, la popolo tute ebriiĝis pro la sangofluo kaj volis pli kaj pli, ĝis kanibalismo atingis neatenditajn sekvojn: laŭ arkivoj en Guangxi oni formanĝis plurajn milojn da homoj en tiu provinco dum dek jaroj!

Tabua tabuo

Estas do tute klare, ke ĉiu kriza kanibalismo ekestas parte pro korpa devigo — oni ja devas vivi, aŭ oni malsatmortos; kaj parte, la alia flanko de la afero, pro socia amashisterio kaj socia premo. Temas pri rompo de la plej tabua tabuo de la homo, nome, ke oni tuŝas kaj kvazaŭ malhonorigas la korpon de mortinto, aŭ eĉ de vivanto. Ĉiu antropofagia fenomeno transiras iun limon de tio, kio estas konsiderata konvena kaj sankta, kaj tial estas interese, estas fascine por la homoj tion fari. Korpo de alia ja estas tre sankta afero, kaj se oni distranĉas aŭ aliel perfortas ĝin, oni pekas tre forte antaŭ la okuloj de la socio. Ĝis antaŭ nelonge oni devis fari kirurgiajn eksperimentojn kaŝe, ĉar estis tabue tuŝi mortintojn — iliaj korpoj ja ripozu en paco!

Sed se la tuta socio partoprenas en la buĉado kaj frandado de iu(j), individuo ne rajtas esti ekster la ludo, sed devas kunmanĝi... alikaze la individuo riskas mem esti manĝota. Tiel okazis pri la ĉina kultura revolucio, kaj tiel okazis ankaŭ parte en la Pacifika regiono. Kroma fakto estas ke homoj, ekvidante homan sangon, tute ebriiĝas kaj deziras freneze havi pli (komparu ekzemple kun la avinoj trikantaj kaj kriantaj "pli, pli!" apud la gilotinoj dum la franca revolucio), kaj tiel la situacio iĝas neregebla, por ne diri komplete freneza. Ĝi kutime evoluas tra tri fazoj: la komenca, kie homoj amase spertas terurajn aferojn; la rapidiga, kiam oni ekmanĝas aliajn homojn kaj okazas pliaj teruraĵoj; kaj la plena frenezeco, kiam nenio kaj neniu plu regeblas kaj oni ĉiel rompas ĉiujn ordojn, ordonojn kaj tabuojn. Nur nova granda socia katastrofo aŭ okazaĵo povas haltigi tiun evoluon.

Homa viando, la plej malpermesata manĝaĵo, ne ĉesos esti frandaĵo, nek ĉesos fascini la homaron. Kial? Ni eble devas serĉi la respondon en ni mem, en nia subkonscio. Dume, ni povas iri spekti filmon, legi librojn prihororajn aŭ simile, por transiri la limon de la tabuo. □



La angulo de Ludmila kaj Petro


multajn el la kemiaj elementoj, kiuj estas sur la Tero, oni retrovis en la suna spektro. Multaj el ili ekzistas en nur tre malmultaj kvantoj tie.

En la suno, ekzemple, estas averaĝe nur 9 atomoj da oro por ĉiuj 10 (12) atomoj de hidrogeno. Ŝajnas do, ke tie oro tute malmultas. Ni tamen memoru, ke la suna maso egalas al $2 \cdot 10^{18}$ tunoj da oro.


Konklude, nia stelego enhavas ĉirkaŭ $2 \cdot 10^{18}$ tunojn da oro.

Laŭ nunaj prezoj (1 gr. da oro = USD 5), tiu kvantego da oro valoras pli malpli USD 10^{25} (100 000 000 000 000 000 000 000 000).

La trezoro tamen estas gardita en unu el la plej sekuraj lokoj de la universo.



facile eblas dividi kvadraton je para nombro da trianguloj kun egalaj surfacoj. Por tio sufiĉas dividi unu el



la diagonaloj je n egalajn partojn kaj punktojn de la divido kunigi kun verticoj de la kvadrato, kiuj ne estas finoj de la dividitaj diagonaloj. Ekzemple: divido en 16 triangulojn:

La bazoj de la trianguloj egalas kaj valoras a , kaj la ortantoj ankaŭ egalas kaj valoras $\frac{\sqrt{2}}{2}x$, kie x estas longeco de la kvadrata latero. Tamen ĉiuj surfacoj egalas $\frac{ax\sqrt{2}}{2}$.

Montriĝas, ke oni ne povas dividi kvadraton je nepara nombro de trianguloj kun egalaj surfacoj.

Ludmila kaj Piotr Maliccy,

Ŝi (n. 1967), magistro inĝeniero pri konstruado, laboras en projektoficejo. Li (n. 1969) studas matematikon ĉe Universitato Nikolao Koperniko en Toruń. Tiu ĉi simpatia paro el Pollando akompanos nin ankaŭ dum 1994.




Ili ne estis bosniaj Romeo kaj Julieta. Ili estis Admira Ismić kaj Boško Brkić el Sarajevo. Kiam ili naskiĝis en 1968, printempe kaj somere, pri la okazaĵo sciis nur familianoj kaj la plej proksimaj amikoj de iliaj gepatroj. Kiam ilin oni mortigis la 18-an de majo 1993, internaciaj gazetaraj oficejoj raportis: "Junan aman paron oni mortigis sur ponto Vrbanja super la rivero Miljacka. Boško kaj Admira. Li estis serbo, ŝi muzulmanino". Iliaj plej koraj karuloj estis tre malproksime de ili je la horo de ilia morto. Kristo kaj Mahometo ek-uzis siajn militajn vestojn kaj sur-metis metalajn okul-vitrojn. La Milita Dio decidis. Boško kaj Admira prenis unu la manojn de la alia kaj falis sur la piedirejon de la ponto, kie ili restis dum tagoj.

La familioj Brkić kaj Ismić ne estis kiel familioj Montecchi kaj Capuletti (elparolu *montekki* kaj *kapuletti*). Ili havis nenion kontraŭ la amo de siaj gefiloj. Ŝajnas, ke nek Kristo nek Mahometo havis ion kontraŭ la fakto, ke tiu ĉi paro interŝanĝu siajn unuajn kisojn jam en sia deksesa jaro. Sed poste venis la tempo de la Milita Dio. La patrono de Boško oni mortigis. Liaj patrino kaj pli juna frato foriris al Serbio, sed Boško restis en Sarajevo kun sia Admira. Ili estis jam naŭ jarojn kune. Unu milito ne sukcesis apartigi ilin. Nek la Biblio kaj Korano. Ili estis veraj homoj. Ankaŭ nun, eĉ se la sango estas disjedita kaj ĉio ŝanĝiĝis.

La gazetoj raportis: "Sarajevan amon-paron, Admiran kaj Boškon, oni mortigis sur flanko de Miljacka, kiam ili provis transiri de la muzulmana al la serba urboparto."

Kune por



Stelo-moneroj denove haveblaj!

Universala Ligo transdonis komisie al UEA la tutan restantan stokon de la stelo-moneroj, tiel ke la unika kolekto de tiuj numismatikaĵoj estas denove aĉetebla.



★ Kompletu de stelo-moneroj.

Kvar moneroj de 1, 5, 10 kaj 25 steloj. Vidu apartajn priskribojn ĉi-sekve. **Prezo: 75 gld.**

★ Monero de 1 stelo.

Bronza. Diametro 20mm., dikeco 1,5mm, pezo 3,4gr. Havebla nur en kompleto (vidu ĉi-supre).

★ Monero de 5 steloj.

Latuna. Diametro 23,5mm., dikeco 1,7mm., pezo 5gr. **Prezo: 4,80 gld.**

★ Monero de 10 steloj.

Kupronikela. Diametro 28mm., dikeco 2mm., pezo 9gr. **Prezo: 9,90 gld.**


★ Monero de 25 steloj.

Ĝinta (90%). Diametro 38mm., dikeco 2,5mm., pezo 19gr. **Prezo: 60 gld.**

Triona rabato ekde 3 ekz. de la sama monero aŭ de 3 kompletoj. Aldoniĝas 10% por afranko kaj (por klientoj el Eŭropa Unio) 17,5% por imposto. Mendu ĉe UEA!

ĉiam

tre
facila



Tio okazis la 18-an de majo 1993, je la kvara horo post-tagmeze. La serbaj kaj muzulmanaj estroj ja permesis al la juna paro transpasi la limon. Ili rapide trairis 500 metrojn kaj alvenis al la ponto Vrbanja... sed ĝuste tiam du kugloj* faligis ilin samtempe. Ili havis nur eron da tempo por ĉirkaŭ-braki unu la alian. Iliaj korpoj kuŝis tie dum sep tagoj. Ili kuŝis tie, nek je serba nek je muzulmana flanko, sed je sia propra, ama flanko. Ĉio-povaj manoj kolorigis la ĉiamajn bildojn, dum Mahometo kaj Kristo staris en siaj

militaj vestoj kun metalaj okulvitroj. Admira kaj Boŝko deziris esti tio, kio ili estis kaj kion nek dio nek homoj, nek religio nek politiko povus doni al ili. Tiu iro, kiu for-portis ilin ĉe la norda flanko de Miljacka estis la irado de ilia kredo je la heimco kaj vorto de militistoj.

"Mi parolis kun lia patrino kaj ŝi permesis al mi en-tomb*-igi ilin kune en Sarajevo – diris Zijah, la patro de Admira. – Ni deziras, ke ili estu kune en la tombo, same kiel ili estis kune en la morto."

La 26-an de majo La Voĉo de Ameriko informis, ke post sep tagoj kvin serbaj militantoj rapidis 150 metrojn sub pafado el ĉiuj direktoj kaj forprenis la korpojn de la du gejunuloj, kiuj tiel povis ricevi indan entombigon.

Tiuj ĉi malbonaj tempoj finiĝos. Kaj eble la ponto estos nomata je la nomo de Admira kaj Boŝko. Gejunuloj staros sur ĝi kaj parolos pri la tempo de "la nova monda ordo". Kiam Kristo kaj Mahometo surmetis la militajn vestojn, Boŝko kaj Admira, same kiel multaj aliaj gejunuloj en Bosnio kaj Hercegovino, surmetis nur sian koron. Kaj ilia koro kaj amo estis tiel puraj, ke ili deziris nur unu aferon: resti kune. Same en la vivo kiel en la morto.

La telefonoj sonadis ĉie, jen la plej lasta novaĵo: Oni mortigis Boŝkon kaj Admiran. Tro multe eĉ por Kristo kaj Mahometo.

Esperantigis Zoran Ĉirić, Serbio

kuglo: metala peco, kiu rapidege eliras el mortigiloj
tombo: truo en la tero por morta korpo

Krucvorto

Sfinksido, Francio

Sendu vian solvon al nia redakcio antaŭ la 7-a de majo 1994. Inter la partoprenantoj ni lotumos ekzempleron de La bela subtera mondo de Leander Tell, Lingvistikaj aspektoj de Esperanto de John Wells aŭ Patrino koro de Nevena Nedelčeva, laŭ via elekto.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2									
3				■					
4	■				■				
5		■							■
6									
7							■		
8		■			■				
9								■	
10									■
11						■			
12		■							

HORIZONTALE

- Majeste, pompe
- Nemalhavebla por biciklisto (s.f. = sen finaĵo)
- Mediterranea fiŝo – Zorge elpensi (figurasence)
- Ktp – Malgranda laŭborda ŝipo, havanta 2-3 mastojn (s.f.)
- Nome – Finnlando (s.f.)
- Funelforma anatomia elemento super la hipofizo (s.f.)
- Poroza – Maloftega metalo, kies atomnumero estas 88
- Trastrekenda – Centra navo de helenaj k romiaj temploj (s.f.)
- Sendiulo.
- Ne eblas al ĝi ŝovi la nazon en fremdan vazon
- La lasta batalo (s.f.) – Eksplozaĵo, kiu ne multe pezas kompare kun atombombo
- Pronomo – Moderna japana sekto de ŝintoismo, kiu alprenis Esperanton en 1923

VERTIKALE

- Jurnalistajn
- Denove – Meti ornaman planton en florpoton
- Duobla movo ŝak-luda por sekurigi la reĝon – La sepa – Japana monunujo
- Mallongigo por fama revuo, redaktita de F. Szilágyi (1955-1967), poste de W. Auld (1967-1973) – Ĉefurbo de Paragvajo
- Ŝprucigo de akvo sur la korpon – Entirebla ĉe la kato (s.f.) – Amplekso de la instruisteco de persono
- Disrompiĝante, kiel televidila tubo
- Prepari kun iu narkota substanco – La ĉefa arterio
- Tropika herbo uzata por fari likvorojn kaj farmaciaĵojn – Verba sufikso
- La dua libro de la Biblio (s.f.) – Malpreni – Trastrekenda litero

La plej granda monbileto

facila

La lastan 30-an de aŭgusto, la Popola Banko de nia lando aperigis novan monbileton. Pro la prez-altiĝado, lastatempe aperis multaj novaj monbiletoj, ĉiam pli kaj pli grandaj. Post la serio de centmilion grandeco, la plej nova monbileto apartenas al pli alta klaso: 1 000 000 000! Ĉu vi sukcesis tralegi tiun numeron? Eble vi unue devus iomete kalkuli...

Sen tro streĉiĝi vi povas fin-pensi, ke baldaŭ ni havos monbileton de unu biliono! Kaj plej terure estas, ke ĝi nuntempe valorus nur 7-8 DEM (= germanajn markojn)! Imagu prezojn de nur 30 DEM. Ĉu vi kuraĝas esprimi, ekzemple, 96 DEM je dinaroj (1DEM = 17000000)?

Ŝajnas, ke nuntempe ni havas la plej grandan monbileton en la tuta mondo! Se la registaro ne faros ion sur la ekonomia kampo, certe ni ne atendos longe por eĉ pli granda sumo!

Zoran Ĉirić

REZULTOJ

7

La venkinto de nia konkurso *Kion vi scias pri la Vraca IJK?* (KONTAKTO 136, 1993:4) estas **Rolf Ernst** el Svislando. Gratulon al li! Respondoj jenas: 1. Ĉokolademula Esperanto-Movado; 2. Kataluna; 3. Blanka fromaĝo; 4. 33; 5. Durex; 6. Unufoje dum la tuta kongreso; 7. Blatoj; 8. Dikulin.

Maldekstre staras la solvo al la krucvorto publikigita en KONTAKTO 137/138 p. 9.

	R		C		M	S	T								
	S	I	L	F	O	D	E	T	A	L	E				
	M	A	G	I	I	L	O	R	U	L	E	T	O	J	
	M	A	R	D	O			D	O	M	A	Ĉ	O		
	K	A	R	O		P	R	E	N	O		I			
	I	D		L	I	M	A	K	O		E	M			
	A	L	I	E	S		K	A	J		J	E	L	P	I
	A		M	A	L	A	L	T	A		T	I	A	L	
	A	K	T	O	R	O		N	A	G	L	E	R	N	I
	T		J	A	K	T	O		A	E	R	U	J	O	
	H	U	S		O		V	A	N	G	O		O		
	K	I	A	L		L	A	S	T	A		N	S		
	F	O	R	T	I	K	A		K	A	S	T	E	L	O
	R	E	P	L	I	K	O		E	M	A	S			
	M	O	N	O	I	K	A		M	A	T	E	N	E	
	V	I	D	U		N	E	T	A		P	R	A	G	O
	S	I	A	V	I	C	E		S	I	A		O		
	T				K	A	D	R	A	S		S	R		
	S	A	N	K	T	A		R	I	G	O	R	U	L	O
	K	A	V	A		L	A	M	A		A	P	U	D	
	S	V	I	S	A		L	A	C	I	G	E	M	I	
	D	I	O	N	O		R	O	S	A		A	R	A	O

KONTAKTO n-ro 139 (1994:1)

**Recenzinte pri
"La diabla
cirklo"
en nia
pasinta
numero,
Bernard
Golden**

SATVANAJ¹ proverboj

BERNARD GOLDEN, HUNGARIO

**nun prezentas la unuan eron de tri-parta
eseo pri... la diablo en proverboj.**

Laŭtema traktado de proverboj

La publikigo de esperantigitaj versioj de etnolingvaj proverboj estas ŝatata okupo de homoj interesigantaj pri popolliteraturo kaj folkloro. Jam en la jaro 1888 d-ro Zamenhof plenigis duonpaĝon en la *Dua Libro* (p. 47) per "popoldiroj", kaj poste li kompilis tutan libron, la faman *Proverbaro Esperanta*, kiu estas Esperanta versio de la kolekto de proverboj kaj esprimoj publikigita de lia patro, Marko Zamenhof. La valoron de la uzado de proverboj Zamenhof koncize reliefigas en jena ekzemplo: "Proverbo estas sperto, proverbo estas averto."

Ĝenerale la aro da proverboj aperantaj en Esperantaj periodaĵoj kaj libroj tuŝas plej diversajn aferojn sen iu komuna ligo inter si. En antaŭe publikigitaj artikoloj pri proverboj mi provis grupigi ilin sub gvida temo, kaj interne de tiu klasifo*, mi aranĝis la proverbojn laŭ specifaj signifoj. Tiu metodo montras en tre evidenta maniero, kiel similaj observoj pri homoj kaj la mondo povas esti diversmaniere esprimataj. Valoras kompari ankaŭ la proverbariaĵojn pro la nuancado de konceptoj. Plej okulfrapaj estas proverboj esprimantaj kontraŭdirajn nociojn; ili instigas legantojn demandi, kiun vojon al saĝeco oni sekvu, kie vere troviĝas la vero, kaj ĉu pravas la proverbo "Ĉiu medalo du flankojn posedas."

En tiu ĉi artikolo mi ilustras la laŭteman metodon per pritrakto de la diablo, liaj personaj trajtoj kaj liaj agadoj. Mi ĉerpis ekzemplojn el jenaj fontoj: *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof, etnolingvaj kaj Esperantaj frazeologioj, etnolingvaj kolektoj da proverboj, kaj diversaj vortaroj. En miaj tradukoj de la etnolingvaj versioj, mi provis sekvi la stilon, kiun Zamenhof mem uzis.

Kelkloke mi elpensis originalajn proverbojn, kiujn mi bezonis por praktikaj frazeologiaj celoj. Proverboj signitaj per la litero "Z" kaj numero troviĝas en *Proverbaro Esperanta* (18 gld. ĉe la Libroservo de UEA).

1. La diablo estas ĉie proksima kaj ĉiam preta agi.

- La diablo neniam estas malproksima.
- La diablo ne dormas.
- Eĉ kiam la diablo ronkas, li ne dormas.
- Ĉ. Diablo ne ĉiam unu pordon sieĝas. (Z 333)
- Kiam la diablo ne povas veni, li sendos.
- Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas. (Z 870)

1.1. La diablo ne timas embuski eĉ proksime al religiuloj kaj sakralaj* lokoj.

- Ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas. (Z 238)
- Malantaŭ la kruco staras la diablo.
- Kie Dio havas sian preĝejon, la diablo havos sian kapelon.

2. Estas danĝere priskribi la diablon, ĉu bilde ĉu vorte.

- Ne pentru diablon sur la muro. (Z 1722)
- Ne voku diablon, ĉar li povas aperi. (Z 1765)
- Oni ne devas dufoje voki la diablon.
- Ĉ. Diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas. (Z 334)
- Ne rakontu pri l' diablo eĉ en fablo. (Originala)

3. La diablo havas bonajn, eĉ homajn trajtojn.

- La diablo ne estas tiel nigra, kiel oni ĝin pentras.
- La diablo kelkfoje diras la veron.
- La diablo estis bela, kiam li estis juna.
- Ĉ. Ankaŭ diablo tondron suferos. (Z 95)
- Ankaŭ por diablo tondro ekzistas. (Z 97)
- Ankaŭ la diablo trankviliĝis, kiam li falis de sur la arbo.
- Ankaŭ la diablo enuas, sidante sur tergibo.
- Ankaŭ la diablo estus bona, se li ne estus obstina.

3.1. La diablo ne estas bonigebla.

- Estas malfacile kalki la diablon.
- Iam diablo, ĉiam diablo.
- Eĉ la diablo ne povas kaŝi sian fendohavan hufon.
- Ĉ. Disrompu la diablon, lasu lin foriri; ĉiam li restas diablo.
- Multaj diabloj ne valoras eĉ unu anĝelon.

speciale

Marto alproksimiĝas kaj tre eble vi ricevos *martenika*-n de via bulgara korespondamik(in)o. Sed...

Martenika, marto-insigno, estas speciala insigno konsistanta el du kuntorditaj silkfadenoj, blanka kaj ruĝa, ĉe kies ambaŭ finoj pendas kvastetoj ankaŭ el blankaj kaj ruĝaj silkfadenoj. Ĝi estas simbolo de paco, amikeco, sano kaj feliĉo. Ĉiujare, je la unua de marto, bulgaroj ligas ĝin al sia maldekstra manradiko, aŭ kroĉas ĝin sur la bruston, kaj nur vidante la unuan hirundon demetas ĝin. Tiu kutimo ekzistas nur en Bulgario. Pri ĝia deveno estas interesa antikva legendo:

Antaŭ 13 jarcentoj, en la jaro 681, gvidate de sia ĥano Asparuĥ, bulgaroj transpasis Danubon kaj fondis la bulgaran ŝtaton sur la balkana



...Kio estas *martenika*?

duoninsulo. Okaze de tiu grava evento, la idolanaj pastroj faris oferdonon al la prabulgaraj dioj; ĝuste je la kulmino de la oferdona ceremonio rapida hirundo surflugis la ŝultron de la ĥano. Al ĝia piedeto estis ligita fenkol-trunketo, kiu, laŭ prabulgara kredo, estis simbolo de paco, amikeco kaj portis sanon kaj feliĉon. Ĝin estis sendinta la fratino de la ĥano, kiu tre ĉagrenis sian amatan fraton. La blanka silkfadeno, per kiu la fenkol-trunketo estis ligita al la piedeto de la hirundo, aspektis dukolora – blanka kaj


ruĝa, ĉar kiam la fratino ĝin tranĉis, ŝi pikvundis sian fingron kaj sangmakulis la fadenon. La idolaj pastroj

diris, ke tio estas signo de dia favoro. Ili ĵetis la fenkoltrunketon en la oferfajron kaj solene ligis la blanka-ruĝan silkfadenon al la maldekstra manradiko de ĥano Asparuĥ. Vidinte tion, la ĉeestantaj bulgaroj kaj slavoĵ sekvis tiun ekzemplon, kaj ligis al siaj maldekstraj manradikoj blanka-ruĝajn fadenojn. Tio okazis en la unua tago de marto.

Tiel naskiĝis la kutimo. De tiam, bulgaroj ĉiujare je la unua de marto surportas sian marto-insignon, *martenika*. Ili donacas ĝin ankaŭ al siaj parencoj kaj amikoj. Per tio ili salutas ilin pro la alproksimiĝanta printempo esprimante amikecon kaj bondeziron.

Bojana Prodanova, Bulgario

per **KONTAKTO** al PIV!



jes, abonante **KONTAKTO** por 1994 vi havos la ŝancon gajni **Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto!** TEJO lotumos ĝin inter ĉiuj abonantoj kaj junaj membroj en la 50-a IJK en Ch'onan, Koreio. Ankaŭ aliaj premioj atendas.

Ne perdu ĉi tiun ŝancon!

ABONTARIFO 1994

Lando/valuto			
Aŭstralio/dolaro	30	Francio/franko	125
Aŭstrio/silingo	240	Germanio/marko	37
Belgio/franko	755	Hispanio/peseto	2100
Brazilo/guldeno	19	Israelo/guldeno	31
Britio/pundo	14	Italio/liro	29 000
Danlando/krono	150	Japanio/eno	2880
Finnlando/marko	115	Kanado/dolaro	27
		Nederlando/guldeno	40
		Norvegio/krono	145
		Pollando/guldeno	19
		Portugalo/eskudo	2300
		Svedio/krono	160
		Svislando/franko	31
		Usono/dolaro	21

4. Oportuneco kaj hipokriteco de la diablo

- En tempo de bezono la diablo manĝas muŝojn.
- La diablo povas citi la Biblion por siaj celoj.
- Kiam la diablo maljuniĝas, emerito li fariĝas.
- Kiam la diablo estis malsana, monako volis esti li; kiam la diablo estis sana, diabla monako estis li.
- Kiam neniu volas porti la krucon, tiam la diablo devas fari tion. (Sed jenaj du proverboj aludas malbonajn sekvojn.)
- Estas malbona procesio, kiam la diablo portas la krucon.
- Estas malbona batalo, kiam la diablo portas la standardon.

5. La homo kiel diablo

- Esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo. (Z 537)
- Sanktulino ekstere kaj diablino enhejme.
- Vizaĝo agrabla kaj ungo diabla. (Z 2606)
- Inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela. (Z 760)
- Tute sankta ekstere, tute diabla interne.
- Juna sanktulo antaŭas al maljuna diablo.
- La kruco sur la brusto kaj la diablo en la koro.
- La rozario en la mano kaj la diablo en la kapuĉo.
- En buŝo Biblio, en koro malpio. (Z 483)
- Kuracisto estas anĝelo ĉe konsultado sed diablo okaze de pagado.


5.1. Virinoj kaj la diablo

- Malbona virino diablon superas. (Z 1425)
- Viro, virino kaj diablo estas la tri gradoj de komparacio.
- Virino estas tindro, viro estas fajro; la diablo venas funkciigi la balgoblovilon.

Konkludo

La proverboj inkluditaj en la ĉi-supraj kategorioj pritraktas kelkajn aspektojn de la karaktero de la diablo. Ankoraŭ restas en mia kolekto dekoj da proverboj temantaj pri interrilatoj de homoj kaj la diablo en diversaj situacioj.

Grava limiga faktoro en la kolektado de la proverboj estas la uzo de fontoj el nur okcidenteŭropaj lingvoj kaj kulturoj. Estus tre utile entrepreni esplorprojekton pri samtemaj proverboj el aliaj partoj de la mondo por ekscii, kiuj nocioj estas universalaj kaj kiuj estas ligitaj al specifaj kulturoj. (Daŭrigota)



Martin Burkert

klasifo: klasifiko

sakrala: apartigita for de la komuna uzado pro religia karaktero kaj inspiranta respektoplenan timon.

anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

Mi (29-jara) kaj mia edzino, Lena, volus korespondi en Esperanto pri biologio, geografio, historio kaj kuirarto. Ni havas etan filinon Tanja, kiu siavice havas testudon Rozo. Skribu! Igorj. V. Beresnev, ul. Gorjkogo 1.46, RU-152 900 Ribinsk, Jaroslavskaĵa obl. Rusio.

Mi ŝatus interŝanĝi ideojn, poŝtkartojn, librojn. Pekim Vaz, Caixa Postal 182, BR-66017-970 Belém - PA, Brazilo

Kiu interesiĝas pri starigo de **Eŭropa unuigo de Esperanto-kampademuloj?** Planataj estas komunaj kampadoferioj dum ĉiu sezono en tuta Eŭropo kun partoprenantoj el ĉiuj eŭropaj regionoj. Alparolataj estu ĉiuj aĝogrupoj, senfamiliuloj, paroj kaj familioj, kun ĉiaj tendoj, karavanoj kaj ruldomoj. Anonciĝu ĉe: Lars Böhmer, Dahlerdyk 81a DE-47803 Krefeld Germanio tel. +49 2151 20546.

Scivolemuloj sin amuzos vidante feinojn adoratajn ĉiuaŝuguste. Skribu al Oshó-Davies Olúwábùnmi P.O. Box 98 R13 Iwaro Quarter, Osi-Asise Ondo State Niĝerio.

Nova adreso en Stockholm: Esperanto-Centro en Stockholm translokiĝis al Vikingagatan 24 SE-11342 Stockholm, Svedio. √ +46-8-340800 (apud subtera stacio St. Eriksgatan)

Printempa Semajno Internacia ...
... iĝas 10-jara!
Partoprenu la 10-an internacian familian semajnon inter la 1-a kaj 9-a de aprilo 1994 en Junkerath, Germanio, apud la landlimo kun Belgio kaj Luksemburgio. Ankaŭ unuopuloj estas bonvenaj! Petu informojn de PSI, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio.

Adres-ŝanĝo: Bonvolu noti la adresŝanĝon de MONTEJO/NESPA kaj same tiel de s-ro Dipendra kaj s-ro Razen: P.O.Box 6304, Kathmandu, Nepalo.

16-jara studento deziras korespondi kaj interŝanĝi. Amir Mohamady, No. 4, Mohamady Lane, Ayatullah Kashani Ave. IR-69166 Borujerd, Irano

15-jarulo deziras korespondi tutmonde. Andrés Molano Rojas Carrera 100B No. 75-13 Santa Fé de Bogotá D.C. Kolombio.



Mi bezonas vian pardonon. Vi mirigas min! Pri kio mi devus vin pardoni?

Vi certe memoras, ke vi rakontis al mi la okazaĵon kun la gravulo... vi scias: tion, kio okazis, kiam vi traveturis Parizon ege rapide en ŝtata aŭtomobilo... (1)

Kompreneble jes, mi memoras.

Mi instruas Esperanton, kaj mi rimarkis, ke tiun okazaĵon mi povas facile rakonti al miaj lernantoj. Mi tion faris sen peti vian permeson. Kaj tion vi eble ne pardonos al mi. Estas ja via propra vivo. Kiurajte mi disrakontas ĝin?

Se vi rakontis nur unufoje al eta grupo, la vorto *disrakonti* estas tute malĝusta. Sed mi permesas al vi rakonti ĉiujn miajn stvardinajn* spertojn. Disrakontu ilin al la tuta mondo, se tio helpas al viaj lingvo-kursoj.

Mi ege dankas vin. Vi estas vera amikino.

elĉerpiĝis...



... nia stoko de **KONTAKTO 127 (1991:1)** kaj daŭre venas mendoj por tiu jarkolekto. Cu vi pretas afable redonaci al la Centra

Oficejo vian ekzempleron de tiu numero? Koran antaŭdankon!

tre
facila



Kompreneble mi estas via amikino. Kaj por tion montri eĉ pli bele, jen plia rakonto, same vera kiel la unua. Vi povas rakonti ĝin al ĉiuj viaj amikoj kaj lernantoj. Mi tute ne zorgas pri la uzo, kiun vi faros el ĝi. Ĉu bone?

Tute bone, dankon. Bonvolu rakonti, mi estas plej scivola.

Estas alia okazaĵo iom simila al tiu, kiun mi antaŭe rakontis. Ankaŭ ĉi-foje mi sentis min same senhelpa, kaj ankaŭ pro gravulo.

Ankaŭ stevardina afero, ĉu?

Jes. Tiufoje, mi stevardis en la unua klaso, kaj tie estis nur unu vojaĝanto: filo de reĝo*. La ĉefo diris al ni, ke ni devas agi kun li tute nature, ke li ne volas aperi kiel iu speciala.

Tion mi komprenas. Devas esti malplaĉe esti iu, kiun la homoj rigardas rimarkinda kaj kun kiu ili rilatas alimaniere ol kun ordinarulo. Certe, mi nenie sentus min hejme, se ĉiuj ĉirkaŭ mi ĉiam agus kiel al plialtulo.

Ĝuste. Tiu viro estis tre plaĉa vojaĝanto, natura, simplamana, tute ne superca. Ni interparoletis, kiam mi alportis al li la manĝon, kaj ni iom ridis kune. La rilato kun li estis tute senproblema. Se mi ne scius, ke li estas filo de reĝo, mi tion neniam pensus. Kelkaj el tiuj unuaklasaj riĉuloj rigardas nin de alte, kaj agas, kvazaŭ ni estus ilia havaĵo. Li ne. Dum la tuta flugo li rilatis al mi plej home, plej bone.

Sed kio rakontinda okazis?

La rakontinda afero prezentigis post la alteriĝo. Ni estis pretaj eliri, li kaj mi. En tiu unuaklasa parto de la aviadilo* estis nur ni du. Tuj antaŭ ol oni malfermis la pordon, mi staris ĉe-flanke, por lasi lin eliri. Sed, anstataŭ moviĝi, li restis surloke, direktis la manon al la pordo, kaj diris al mi, kun bela rideto: "Post vi, sinjorino". En tiu simpla faro, li tiel belmanieris, ke mi ne povis fari ion alian ol agi kiel li volis: mi do eliris, unua...

Kaj kio okazis?

Mi devas diri, ke ne estis bela tago kaj ke la ĉielo estis nokteca. Kiam, trans la aviadila pordo, mi aperis ekstere, ekbriloj el dekoj kaj dekoj da fotiloj direktiĝis al mi. Neniam, en mia tuta vivo, oni tiom fotis min! Samtempe eksonis muziko, kaj multego da starantoj komencis krii*: "Vivu la..." tuj antaŭ ol, ŝajne, ekperdi la parolpovon. Atende staris gravuloj pretaj eldiri ŝtatecan paroladon. Staris tuta muzikistaro. Staris fotistoj el ĉiuj gazetoj de la lando. Ĉio estis preparita por bele kaj feste bonvenigi la homon, kiu eliros el la aviadilo. Sed la unua eliranto estis ne eksterlanda reĝofilo, nur eta mi! □

aviadilo: plej ofta flugveturilo

krii: eligi fortajn malbelajn sonojn

kvazaŭ: kiel se


reĝo: dumviva ŝtatestro, ĝenerale mem reĝido.

stevardo: servisto de trinkaĵoj kaj manĝaĵoj en flugveturilo aŭ ŝipo

(1) Vd. *Plej rapide tra Parizo* en *KONTAKTO* 136, p. 10

Claude Piron,

Svisa civitano, kies infaneco disvolviĝis en Belgio. Tradukisto-protokolisto ĉe UN (Novjorko) kaj poste ĉe Monda Organizo pri Sano (Genevo). Studinte psikologion, li forlasis la tradukan profesion kaj trejniĝis kiel psikanalizo kaj psikoterapiisto. Dum dek jaroj post lia ekŝiĝo el MOS, tiu institucio plu dungis lin por kelksemajnaj misioj en Afriko, Pacifika Insularo, kaj - ĉefe - en orienta Azio. Nuntempe li havas privatan kabineton psikologian kaj instruas en Geneva Universitato. Sub lia pseŭdonimo Johán Valano aperis poemaro, kantokasedo, kvin detektivromanoj kaj kolekto de noveloj. Sub la propra nomo aperis kurso de psikologio, la polemika verko *La bona lingvo*, la konata E-lernilo *Gerda malaperis!* kaj pluraj faciligvaj rakontoj, i.a. en *Kontakto*. "Preskaŭ neniam mi uzas kravatton: sekve tiu ĉi foto mensogetas."



Jaan Ojalo:

esperantaj sinonimoj

NOVAĴO

La plej kompleta de sia speco; bazita sur Plena Ilustrita Vortaro. La unua parto donas sinonimojn por ĉ. 2000 vortoj. La dua parto estas indekso, kiu ebligas trovi sinonimojn por 5500 vortoj. Tre utila por pliriĉigi la vortotrezoron kaj freŝigi la stilon.

Dua korektita eldono, 1993. 96p. Prezo: 15 guldenoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



KONKURSO DE POLA RADIO

Okaze de la 35-jariĝo (la 4-an de aprilo) de la Esperanto-elsendo ĉe Pola Radio, la E-sekcio invitas al konkurso. Gis la 30-a de junio oni sendu respondon (Pola Radio, Esperanto-redakcio, PL-00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Pollando), en laŭplaĉa amplekso, al almenaŭ unu el jenaj demandoj:

1. Kio instigas vin aŭskulti la E-elsendojn de Pola Radio, kaj kian signifon ili havas por vi?

2. Kion vi opinias pri la rolo kaj signifo de la E-elsendoj de Varsovio en la tempo de grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj strebado al partnereco, paca kunlaboro sur nia kontinento?


3. Kigrade la E-elsendo de Pola Radio - fone de viaj nacilingvaj amaskomunikiloj - proksimiĝas al vi la bildon de Pollando?

Inter la lotumotaj premioj estas sonkasedoj, E-libroj, populartaĵoj ktp. La redakcio volonte akceptos eldonaĵojn de E-firmaoj kiel disdonatajn premiojn.

facila

El la vivo de Nasreddin Hoca

Sabira Ståhlberg, Finnlando



Se tiel, ankaŭ ĉi tiel...

Venis al Nasreddin Hoca (elparolu *hoĝa*) najbaro* kun granda potoj.
 – Amiko – diris la najbaro – mi foriros por kelkaj semajnoj. Ĉu vi dum tiu tempo povas zorgi pri mia potoj?
 – Kompreneble – respondis Hoca, kaj prenis la potojn. Post kelka tempo revenis la najbaro.
 – Halo Hoca – li diris – kie estas la potoj?

Hoca donis la potojn al li.
 – Sed Hoca, kie estas la infano de la potoj?
 – Kiu infano? demandis Hoca mire.
 – Kiam mi lasis la potojn al vi, ĝi estis graveda* kaj tuj devis naski idon – klarigis la najbaro. Hoca devis preni malgrandan potojn kaj doni al la najbaro, sed li tre miris. Post iom da tempo la najbaro denove forveturis, kaj lasis la du potojn, la patrino kaj la infanon, al Hoca. Kiam li revenis, li demandis:
 – Hej, Hoca, kiel fartas mia potoj-familio?
 – Ho, najbaro kara, bedaŭrinde kaj la patrino kaj la infano mortis antaŭ nelonge, plendis Hoca.
 – Kio?! – Kriis la najbaro. – Potoj ne povas morti!
 – Nu – respondis Nasreddin Hoca – se ili povas naski, ili povas ankaŭ morti, ĉu ne?

Ĉiela prizorgado

li demandis al Nasreddin Hoca, kio okazas al la luno, kiam ĝi iĝas malnova.
 – Oni prenas ĝin de la ĉielo, tranĉas en pecojn kaj faras el ĝi stelojn – respondis Hoca.



najbaro: homo, kiu loĝas apude
graveda: stato de ino, kiu naskos

Johano tamen ne havis kun si la libron. La interŝanĝista knabino ja pruntedonis ĝin, sed la libro restis kaŝita ene de iu floro.

– Ĉu vi almenaŭ scias pri kiu libro temas? – Xie demandis.
 – Ŝi diris nur ke ĝi estas antikva, kaj ke ne ĉiuj povas legi ĝin.

La imago de Xie Kitchin ĝoje saltis.

Ŝi imagis jene: antaŭ ol li transloĝiĝis al Brilumo, la Tria Granda Demandisto donis la libron al tiu knabino, por ke ŝi gardu ĝin bone kaŝita. Ŝi do kaŝis ĝin ene de floro. Nun, ĉar ŝi enamiĝis, ŝi decidis montri la libron al sia koramiko.

– Kaj el tio sekvas ke ĝi estas la libro de la stranga virino.

– Kiu estas tiu stranga virino? – Johano demandis.

Resumo de la antaŭa ĉapitro

Luis informis al Xie ke la Tria Granda Demandisto nun loĝas en urbo nomata Brilumo. Intertempe, ŝia frato koramikiĝis kun interŝanĝista knabino, kiu promenis ekster la vilaĝo.

Ĉio ĝlate alĝustiĝis en la menso de Xie Kitchin: sufiĉos aliri la libron. Aperis tamen ĝena problemeto: “La knabino pruntis la libron al mia frato. Ne al mi.”

La nura rimedo estis peti de li la komplezon.

– Ne, nepre ne.
 – Sed kial ne? Kial? Ĉu vi ne volas helpi min?

Johano ne respondis.
 – Aŭskultu, mi havas proponon: konsultu vian koramikinon. Se ŝi konsentos, ni iru triope vidi la libron. Ĉu bone?

Li dubis.
 – Vi nur parolu kun ŝi pri la eblo. Se ŝi ne volos ke mi kuniru, do mi ne iros, punkto.

– Ĉu tio vere tiel gravas al vi?
 – Treege.
 – Tamen ĝi estas donaco al mi, kaj eble ŝi ĉagreniĝus.

– Kia timema knabo!
 Post longa interparolo, Xie fine sukcesis persvadi la fraton.

– Sed nur trarigardi! Promesu.
 – Promesite. He, vi ankoraŭ ne diris la nomon de via koramikino.
 – Alice.

Patrino koro

Simplaj, romantikaj rakontoj pri la esperantista vivo

Nevena Nedelĉeva. Rotterdam / La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./pres). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Xie surpriziĝis kiam ŝi renkontis Alicen. Neniam antaŭe ŝi vidis tiel belan knabinon. Kaj krome, je tiu tago Alice estis eĉ pli bela: nudpieda, kun la hararo ne ligita, kaj portanta anĝellarman robon.

“Tute simila al la mia, kiu kuŝas en tirkesto...” Rememori sian robon igis ŝin emi plori. Ŝi ploris nur unu larmon, etan.

– Ĉu vi estas Xie Kitchin? – Alice demandis.

– Jes.

– Mi imagis ĝuste tion.

– Ĉu? Kial?

– Kiam la Tria Granda Demandisto donis al mi la libron, por ke mi gardu ĝin, li diris ke iam aperos knabino al kiu mi devos montri ĝin. Li ne diris sian nomon, sed tamen ŝi nepre estas vi.

Xie ne sukcesis diri eĉ unu vorton.

Johano atentis ĉion. De tempo al tempo li interŝanĝis rigardojn kun Alice, kaj tiam estis kvazaŭ la suno eksplodas en li, tiom bruegis lia koro.

Ili marŝis en la arbaron kie la floro troviĝis.

– Ni alvenas. Jen ĝi. Ĉu ni eniru?

La gefratoj gapis: Ĉu eniri floron?

Alice tamen ne atendis respondon

– ŝi eniris. Xie kaj Johano vidis la facilecon kaj sekvis ŝin.

Interne, ili miris denove: estis same kiel hejmo. Jen tablo kun seĝo, jen bretaro, ŝranko, kaj kelkaj pentraĵoj sur la muro.

– Kiu loĝas ĉi tie? – la knabo demandis al Alice.

– Neniu. Ĝi estis unu el la hejmoj de la Tria Granda Demandisto.

– Ĉu li havis pli ol unu?

– Diversajn. Ĉi-floron, kavon de blanka kuniklo, rokon ĉe la maro, paperdomon en la vilaĝo, kaj li tre ŝatas loĝi en libroj.

Xie ekhavis demandon pretan por eldiro, sed ŝi estis tiel ensorĉita de la tuta afero, ke ŝi ne povis paroli.

Koincide, la frato demandis ĝuste tion, kion ŝi scivolis:

– Ĉu li loĝas en libro nuntempe?

– Laŭdire, jes. Oni diras ke li loĝas en vorto, kiu troviĝas en poemo, kiu troviĝas en libro.

– La vorton mi konas – diris Xie Kitchin – ĝi estas Brilumo.

– Eble li ne plu loĝas en tiu.

– Sed vi ĵus diris...

– Mi diris, sed li ofte ŝanĝas.

Johano pensis ke li mem ne ŝatus loĝi en vorto. Li tre ŝatus loĝi en tiu floro. Je tiu penso li rekte rigardis al Alice, kiu komprene okulumis al li.

Xie volis vidi ĉiujn detalojn de la hejmo samtempe. Ŝi ne sciis kion unue rigardi.

Decidinte vidi la pentraĵojn, ŝi paŝis al la muro kaj surprize kriis:

– La Sanktaj Bestoj... Venu vidi, Johano!

La unua bildo temis pri papilio.

Sub ĝi legiĝis AERO.

La dua bildo temis pri kato.

Sub ĝi legiĝis TERO.

La tria bildo temis pri sireno.

Sub ĝi legiĝis AKVO.

Sed kio plej ravis la knabinon estis ja la lasta bildo, sub kiu legiĝis FAJRO.

– La Drako! Estas drako pentrita ĉi tie!

Alice kaj Johano apenaŭ atentis ŝian ĝojon. Manenmane, rigardante unu la alian, ili interŝanĝis diamantojn.

– Kaj la libro? – Xie interrompis.

Alice malrapide retiris sian manon kaj iris en alian ĉambron. La gefratoj sekvis ŝin.

La ĉambro estis tute malplena. Sed, fakte, estis io tie: alia floro, plantita en la centro de la planko.

Alice metis la manon en la floron, elprenis libron kaj donis ĝin al Xie:

– Jen, vi povas legi.

La libro ja estis treege malnova, kvankam neniu paĝo mankis.

La eldonjaro estis parte forviŝita, sed klare legeblis la unuaj ciferoj: 19...


– Nekredeble! El la dudeka jarcento! Kiel ĝi ankoraŭ ne disfalis?!

(Konkludota en la sekva numero)

Lalande

Flávio Martins Carneiro, trad. Izabel Santiago

6.



13

n-ro 139 (1994:1)

KVARTALO

Ami kinon:

En la celilo/ La fuĝulo


Origina titolo: *In the line of fire*
Usono, 1993

Reĝisoro: Wolfgang Petersen
Skripto: Jeff Maguire
Ĉefroluloj: Clint Eastwood,
John Malkovich,
Rene Russo

Origina titolo: *The fugitive*
Usono, 1993

Reĝisoro: Andrew Davis
Skripto: Jeb Stuart,
David Twohy
Ĉefroluloj: Harrison Ford,
Tommy Lee Jones

Dum la lastaj jaroj, antaŭ la aĉa dinosaŭra plago, en Usono modis produkti filmojn pri psiko-



pataj murdemuloj. Nediskuteble la pinto de tiu filmaro estis la senkruele kruda *Henry, portreto de seria murdisto* (John McNaughton, 1986), unu el la plej memorindaj verkoj de la kinarto ĉi-jardeka. Male, malpinton atingis la tropretenda, stulta kaj falsa *Baza instinkto* (Paul Verhoeven, 1992), kulpa je la negocismo kaj plaĉismo kutimaj al multaj usonaj misfilmoj. Ne genia, sed ja tre bona montriĝis *La silento de la ŝafidoj* (Jonathan Demme, 1991), bunta spektaklo por la vido kaj aŭdo de postulema spektanto. En ĝi, same kiel en la du aliaj streĉfilmoj ĉi-sekve pritraktotaj, la reĝisoro konstruas artverkon operan kaj ĥoran surbaze de precize funkcia meĥanismo, t.e. de kin-skripto malsimple kaj efike harmonia. Oni serĉu en ĉi tiaj streĉfilmoj nenian mondskuan filozofion aŭ abisman kosmogonion, sed netan, puran, kvintesencon kinon.



esplorteamo. Doktoro Kimble (Harrison Ford) trovas hejme sian edzinon murdita, ke oni akuzas kaj juĝas lin pri la murdo, kaj ke, mortkondamnita kaj jam enprizona, li sukcesas eskapi kaj do devas fuĝi. Li devas lerte eviti, ke oni lin rekaptu, antaŭ ol li povos pruvi sin senkulpa (kaj eventuale alian kulpa). Sed lin postspuras kaj postkuras same lerta, vigla kaj ruza registara agenteo (Tommy Lee Jones), helpe de tre laborema

En la celilo prezentas al ni la historion de ano de la usona sekreta servo, Frank Horrigan (Clint Eastwood), kiu, ne sukcesinte malhelpi la mortigon de Kenedio en Dallas en 1963, devas nun, tridek jarojn poste, alfronti la aperon de ulo (John Malkovich) volanta atenci la novan (ne tro klintonecan) prezidanton. Malkovich ludas la rolon de ruza kanajlo tiel neriproĉeble, ke, kiel la misfia Hannibal Lecter (Anthony Hopkins) en *La silento de la ŝafidoj*, li akceptiĝas inter la spektantoj impone kaj ŝoke, intime kaj loge.

Hannibal lerte pruvis, ke eblas estigi simpatiemon al ekrana psikopata murdisto, ĉefe se li elektas kiel viktimojn potencan merdulon aŭ vomindan grasulon. Kontraste, la jam menciita Henry montris, ke la fienco aŭ aĉeco de viktimo ne devus igi nin aplaŭdi senrezerve la sangajn kapricojn de filma buĉisto; ja la celo ne pravigas la rimedojn. Estas interese, ke *En la celilo* asimilis la vidpunkton de Henry, kies scenon pri permana murdo en normalula hejmo ĝi re-kreas novige.

Pro mia aĝo mi ne spektis la televidan serion, kiu patras la filmon *La fuĝulo*. Tiu ĉi komenciĝas

per tio, ke Doktoro Kimble (Harrison Ford) trovas hejme sian edzinon murdita, ke oni akuzas kaj juĝas lin pri la murdo, kaj ke, mortkondamnita kaj jam enprizona, li sukcesas eskapi kaj do devas fuĝi. Li devas lerte eviti, ke oni lin rekaptu, antaŭ ol li povos pruvi sin senkulpa (kaj eventuale alian kulpa). Sed lin postspuras kaj postkuras same lerta, vigla kaj ruza registara agenteo (Tommy Lee Jones), helpe de tre laborema

per tio, ke Doktoro Kimble (Harrison Ford) trovas hejme sian edzinon murdita, ke oni akuzas kaj juĝas lin pri la murdo, kaj ke, mortkondamnita kaj jam enprizona, li sukcesas eskapi kaj do devas fuĝi. Li devas lerte eviti, ke oni lin rekaptu, antaŭ ol li povos pruvi sin senkulpa (kaj eventuale alian kulpa). Sed lin postspuras kaj postkuras same lerta, vigla kaj ruza registara agenteo (Tommy Lee Jones), helpe de tre laborema

Eŭterpa:

Lignofajre

Vi kuras de vi

Kantas Jomart kaj Nataŝa Pizo: Edistudio, 1992. Muzika Kulturo n-ro 10. Kun tekstokajero. Dek tri kantoj. Prezo: 21,00 gld.

Ege frape, la nova eldonaĵo de Edistudio, *Vi kuras de vi*, de Jomart kaj Nataŝa, montras kovrilan foton de Jomart sola — strange, ĉar ili estas du muzikistoj, kiuj funkcias kiel unu.

Saluton mia amikino, unua el dek tri numeroj kun simpla muziko kaj tristaj poemoj pri adiaŭoj, vojaĝado kaj ŝanĝo, establas la ruĝan fadenon de la kantar: ĝi estas trempita en melankolio, tamen sen amareco; la gitaro moviĝas preskaŭ energie kontraŭ la tene-reco de la voĉoj, kaj ĉie sentblas improviza neformaleco kun duonrimoj kiel *longe/ rondon, fenestro/maldekstre, pentri/sentojn*.

Mi estas amata estas melodio vere memorinda kaj eble estas ĝuste tiu kanto, kiu plej proksimas al profunda emocio:

*Kiam malvarmo regos en mondo
Kiam nur vento vagados sur stratoj
Mi al demando pri vivo respondos
Jes, mi estas amata.*

Sen vagi en la muzika kampo, kiun ili elektis, la duopo el Kazaĥio uzas diversajn efektojn. Troviĝas ekzemple bela ton-serio fine de *Ĉu hejmo...?*; la preskaŭ klasika teksaĵo de bonaj kantado kaj ludado en *Nokte*; la "svingo"

de *Ni perdas unu alian*, kiu donas esperon al la deprimito de la temo; kaj en *Mi sopiras*, la komenco de la fino de amo, kiu bildiĝas per ironiaj kontraŭmelodio kaj ritmo. Kiel ĉe la plimulto el la eroj, Jomart verkis kaj tekstos kaj muzikon por *Malgranda miraklo*, kiu tre allogas, eble ĉar ĝi ŝajnas aŭtobiografia.

Antaŭvideble, la geparo elektis *Adiaŭ* por la lasta numero: ĝi plenas je tristeco, sed forirado estas dolĉa malĝojo kaj Nataŝa ridas por ni en la momento de la adiaŭo mem.

Mankas informo pri la studio, kie oni registris la bendon. Tamen Floréal Martorell (de *ROK-GAZET*) detektivis, ke Vladimir Soroka de Pigo-studio en Svedio (kie Jomart kaj Nataŝa nun loĝas)

respondekas pro la profesieca kvalito de la registraĵo kaj miksaĵo. Tute ne necesas la kolora tekstolibreto; la mikrofonoj staras tuj antaŭ la buŝo de la kantistoj, tamen sen tordi la voĉojn. Ĉiu vorto kristale aŭdeblas.

Se vera arto estas la maskado de arto mem, Jomart kaj Nataŝa sukcesis: dum kvinjara kunlaborado ili scipovis krei malstreĉan etoson. Jes ja, oni povus diri, ke ilia formulo restas sama — ĉiam du voĉoj kontraŭ gitaro — sed ĝi estas konvinka, kaj tia ke ĝi facile altiras la publikon. Oni povus diri, ke mankas dramecaj sentoj, ke mankas riproĉoj kaj malsekaj larmoj... sed Jomart Amzejev kaj Nataŝa Berlah perfekte atingis sian deklaran celon: "simplaj lignofajraj melodioj".

Seán Osborne, Nederlando



tempe aventuran kaj aktoran, inter Doktoro Kimble kaj la agenteo Sam Gerard, inter Harrison Ford kaj Tommy Lee Jones.

La filmon aparte distingas ĝia brava devio elde kliŝoj (escepte de la fiulo Sykes, kiu hazarde ne blondas). Tio rekte koncernas la rolon de virinoj en la intrigo, aŭ la karakteron, kaj simpatieblon de la persekutanto Gerard. Dum *En la celilo* starigas iom retorike la demandon pri tio, ke sociaj aŭ ŝtataj tumoroj estas plej fekunda lulilo de kanajloj, *La fuĝulo*, sub la dolĉaj ŝelo kaj karno de spirtena kinaĵo, prezentas subtilan kaj pensigan akuzon, troje ĉevalan denuncon kontraŭ senpune korruptaj privataj kaj publikaj insti-

tucioj, kontraŭ ĉia mortopuno, kontraŭ juĝ-sistemo ebliganta verdikti iun kulpa eŝafoden aŭ ublieten sen sufiĉaj atestoj, pruvobjektoj, konviktiloj.

Resume, jen du spektindaj streĉfilmoj, rezultoj de la sekva kombino, la sola valida en kinarto: bona reĝisoro plus bonaj aktoroj plus same bona skripto.

Georgo Kamaĉo, Hispanujo

skripto: provizora aŭ definitiva antaŭteksto de kultura produkto (foje nur skema aŭ skiza gvidteksto); **kinoskripto, filmskripto,** skribita teksto de filmo, inkludanta ne nur la parolojn de la aktoroj, sed ankaŭ scenajn, lokajn, tempajn kaj aliajn kinajn indikojn por aŭ pri la filmado.

Viaj koncizaj opinioj, reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso (vd. kolofonon).

KONTAKTO en Irano

En Irano bedaŭrinde ne ekzistas Esperantaj legaĵoj kaj kun malfacilo oni povas akiri ilin. Tamen, ĉi tie ni legas vian revuon kaj plezuriga. Mi devas plenĝoje diri, ke *KONTAKTO* estas tre interesa kaj leginda gazeto... Ĉi tie ĝi estas legata fojojn kaj fojojn!

M. Reza Torabi, Irano

Manĝi piron kaj vidi malnovajn filmojn

Dank' al afabla donaco de amiko el Germanio mi, 21-jara studentino pri psikologio, estis tutan jaron abonanto de *KONTAKTO*. Nuntempe mi estas certa, ke *KONTAKTO* estas kaj verŝajne estos mia granda "korespondamiko".

La rakontoj de Claude Piron estas bonegaj. Brave! Plej plaĉis al mi la tre sprita kaj nemulte malgaja "La dikulino" en numero 1993:3. Ankaŭ "Lalande" de Flávio M. Carneiro estas belega verko.

Bedaŭrinde, legi pri malnovaj filmoj seniluziigis min. Ĉiusemajne ni povas vidi novajn filmojn. Post pli ol du jaroj denove devi tralegi pri la samaj filmoj estas enue. Laŭ mi, "JFK" kaj "Drakulo" absolute ne estas ĉefverkoj. Jen mia opinio. Se vi planas publikigi filmrecenzojn, bonvolu skribi pri la plej famaj filmoj kaj venkintoj de Oskaro. Ankaŭ artikolojn pri mondfamaj filmsteluloj mi volonte tralegus.

Entute *KONTAKTO* tre plaĉas al mi. Mi esperas, ke la gazeto restos interesa, sprita kaj bonege ilustrita. Tutkore deziras al vi sukcesojn kaj altan laborkapablon.

Irina Alekseeva, Rusio.

Red.: Ni klopodas, ke la recenzoj atingu la legantojn kiel eble plej frue. Tio ne ĉiam sukcesas, tamen, ĉar ne en ĉiuj landoj la poŝto akurate liveras *KONTAKTO*-n, En Rusio ĝi estas tre malrapida. Similajn misterojn havas la film-distribuo. Mi ekzemple konstatis, ke en Sudameriko eblas spekti usonajn filmojn multe pli frue ol en la kontinenta Eŭropo. Du jaroj da prokrasto ŝajnas tamen iom tro.

Kvarfoje

Skizi la historion de revuo [vd. 30 jaroj da *Kontaktoj!* *KONTAKTO* 137/138 (1993:5/6)] same kiel de asocio aŭ io ajn, ne estas facila tasko, ĉefe kiam la epoko ne estas fora kaj la protagonistoj ankoraŭ vivas. Do mi admiras vian kuraĝon levi la ganton en tiu ĉi defio.

Tamen, almenaŭ koncerne min, vi maltrafis kvarfoje. La plej grava estas, ke vi difinis min studento, kiam mi situis jam sur la alia flanko de la barikado, por gajni mian panon sen butero kiel lingvoinstruisto en vesperaj lernejoj. Sed efektive mi samtempe preparis min ankaŭ al la universitataj ekzamenoj, kies trapaso kondukos al la unua doktorigo, en 1981.

La dua, pli grava maltrafo, koncernas la malfruon de *KONTAKTO*. Kiam mi ekstafetis ĉe la redaktora posteno en 1975, *KONTAKTO* akumulis pli fruan handikapon de pli ol unu jaro. Tian pezegan heredaĵon mi transprenis, kaj, kiam en 1977 mi transdonis ĝin al alia kolego, la malfruo estis nur je unu numero. Do la rekordon de dek ok monatoj, kaj la moko-kantojn pri ĝi, bonvolu antaŭŝovi al la ĉapitro "Renaskiĝo en karnavalo" (redaktoreco de kolego Milojević).

La tria maltrafo koncernas la enhavon de *KONTAKTO* dum mia redaktoreco. Certe *KONTAKTO* okupiĝis pri la socia engaĝo de la esperantista junularo, tute konforme al la tradicia devizo de la revuo. Sed koincidigi tiun periodon kun "movadozo" estas troigo. Okazis nek movadozo nek movada superdozo. Sufiĉas simple trafoliumi la tiamajn numerojn por konstati la realon.

Kvara maltrafo estas pli ĝenerala preteratento pri la atelieroj kie *KONTAKTO*-n oni forĝis. Certe la redaktora figuro estis kaj estas grava, sed ne estas ĉio. Nesalajrata posteno (feliĉa vi, kiu estas escepto!) ne povas kompensi la mankojn de la teknikaj respondeculoj. Mi volas kritiki nenion: al ĉiu sia merito. Sed certe ne estas eble gardi la eldonritmon, kiam la

La laktovendisto

— Elitaligis Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo

Estis kvin laktovendistoj en malgranda urbo, kiuj havis bovinojn* kaj vendis lakton sen-pere al la popolanoj.

Unu tagon, juna sinjorino aĉetis du botelojn* da lakto kaj portis ilin hejmen. Tie ŝi metis la lakton en glason kaj jam pretis ektrinki ĝin, kiam ŝi trovis, ke la laktovendisto trompis* ŝin. Li al-donis akvon al la lakto.

Ŝi forte koleriĝis* kaj en la sama tago iris al la loka ĵurnalo* por publikigi jenan informon:

"Hieraŭ unu laktovendisto en tiu ĉi urbo aldonis akvon al la lakto kaj vendis ĝin al mi. Se li ne sendos du botelojn da lakto pura, tiam mi publikigos lian nomon en tiu ĉi ĵurnalo."

En la sekva tago la hejmistino estis tre feliĉa, ĉar tre frue en la mateno ŝi ricevis dek botelojn da pura lakto: du el ĉiu laktovendisto de la vilaĝo.



Desegno de Felipe Artero Lozano

botelo: longa ujo, kiu enhavas trinkaĵon
bovino: granda hejm-besto, kiu donas ankaŭ lakton
ĵurnalo: ĉiutaga gazeto
koleri: montri fortan malkontenton
trompi: vole erarigi

manuskripto de duona numero perdiĝas survoje al la CO, kaj ĝenerale la CO estas tro okupita por prizorgi ĉi tiun teknikan respondecon. Ĝuste tial ekdeĵoris sur nia ferdeko Stefan MacGill, kiu estis ege bona kunlaboranto kaj referenca konstantulo dum postaj epokoj.

Al mia pozitiva penso pri la aktiveco de Stefan, permesu ke mi aldonu dankan esprimon pri Jouko. Estus maljuste rememori lin kiel la "ununumera redaktoro", eĉ se (kion vi ne skribis) tiu numero (pri televido) estis unu el la plej bonaj en la tuta jardeko. Jouko Lindstedt estis tre valora kunlaboranto, kaj unu el la plej sobraj kaj talentaj intelektuloj kiujn mi renkontis en Esperantio. TEJO ŝuldas al li multon.

Giorgio Siffer, Eŭropo

Ankoraŭ sama, traŝa

Pruntepreninte *KONTAKTO* 1993:4 de mia filino, multe kontentigis min la artikolo de J. Pietiläinen, *La nova monda ordo*. Unuafoje mi aŭdis prelegon de Chomsky en sinagogo de Connecticut en 1968, denove tie ĉi, en Alasko la pasintan printempon... Lia mesaĝo ankoraŭ samas, ankoraŭ trafas; bedaŭrinde, intertempe la mondo (kaj eble pli grave, la usona voĉdonantaro) ankoraŭ ne aŭskultas kaj komprenas. Ĉiuokaze, miajn gratulojn al Francjo pro la profesie pripensinda enhavo de la revuo.

George Partlow, Usono



Kiel verki per facila lingvo?

Kiam vi verkas por komencantoj, ne pensu: "Mi devas uzi facilan lingvaĵon. Kion mi povas diri per ĝi?" – Vi devas pensi: "Mi volas komuniki ion. Kiel mi povas esprimi ĝin per facila lingvaĵo?"

Se vi spertos problemojn, vi eble trovos ke estas pli facile unue verki la artikolon per normala lingvaĵo kaj poste simpligi ĝin. Sed memoru: la redaktoro pli facile povas simpligi interesan artikolon ol aldoni interreson al simpla sed banala materialo. Do, se vi ne sukcesas sufiĉe simpligi vian lingvouzon, bonvolu tamen sendi la artikolon.

La redaktoro rezervas al si la rajton laŭnecese korekti, mallongigi kaj simpligi artikolojn.

Facileco: La facillingvaj artikoloj de *Kontakto* aperas en la niveloj:

Tre facila: Uzu nur tiujn elementojn de la listo, kiuj aperas grase presitaj, plus tiujn de "Aldone". Se vi deziras uzi alian radikon, necesas klarigi ĝin en la artikolo mem aŭ aldoni piednoton.

Facila: Vi rajtas uzi ĉiujn elementojn de la listo. Aliajn necesas klarigi.

Longeco: Longegaj artikoloj timigas komencantojn! Do prefere ne verku pli ol proksimume 800 vortojn. Si vi opinias ke tiu longeco tro limigas vin, verku pri unu aspekto de via temo pli profunde, anstataŭ provi kovri la tutan kampon.

Stilo: Uzu simplajn frazostukturojn kun kutima vortodo. Evitu pezajn kunmetaĵojn. Prefere ne uzu verban substantivon se eblas uzi verbon anstataŭe.

Gramatiko: Je la nivelo 2 jam estas uzata la tuta baza gramatiko, sed je la nivelo 1 oni ne uzas la participojn (krom la substantiva finaĵo *-anto*, necesa en tiaj vortoj kiaj *leganto*, *prezidanto*, *komencanto*, k.s.).

Kunmetaĵoj: Ne estas fiksita regulo pri la uzo de streketo por dividi kunmetitajn radikojn. La redaktoro aldonos streketon kiam tio ŝajnas necesa por ke la senco de kunmetaĵo estu klara.

Nomoj: Vi rajtas libere uzi nomojn de landoj, lingvoj, popoloj kaj urboj. Ne esperantigu propran nomon mem, sed uzu ĝin nur kiam ĝi jam efektive ekzistas en Esperanto. Prefere uzu nacilingvan (latin-alfabetan) formon, aldonante interkrampoj la prononcon.

abon-
acet-
adres-
aer-
afabl-
afer-
ag-
agrabl-
ag-
ajn
akcept-
akr-
aktiv-
akv-
al
ali-
almenaŭ
alt-
am-
amas-
ambaŭ
amik-
amuz-
angul-
ankaŭ
ankoraŭ
anonc-
anstataŭ
antaŭ
apar-
apart-
aparten-
apenaŭ
aper-
apud
aranĝ-
arb-
art-
artikol-
asoci-
aspekt-
atak-
atend-
atent-
ating-
aŭ
aŭd-
aŭskult-
aŭtobus-
aŭt(omobil)-
aŭtun-
av-
azen-

baldaŭ
ban-
bar-
bat-
batal-
baz-
bedaŭr-
bel-
best-
bezon-
bibliotek-
bicikl-
bier-
bild-
bilet-
bird-
blank-
blov-
blu-
bol-
bon-
bord-
botel-
bov-
brak-
bril-
bros-
brul-
brun-
brust-
buŝ-
buter-
buton-

cel-
centr-
cert-
ceter-
cigare-
cirk-
camb-
ĉapel-
ĉar
ĉe
ĉef-
ĉemiz-
ĉes-

ĉeval-
ĉiel-
ĉirkaŭ
ĉu
da
danc-
dang-
dank-
dank-
daŭr-
de
decid-
defend-
dekstr-
demand-
dens-
dent-
desegn-
detal-
dev-
dezir-
di-
diferenc-
difin-
dik-
dir-
direkt-
disk-
disk-
divers-
divid-
do
doktor-
dolĉ-
dolor-
dom-
domaĝ-
don-
donac-
dorm-
dors-
drat-
dub-
dum
dung-

eben-
eĉ
eduk-
edz-
efektiv-
efik-
egal-
ekonomi-
ekskurs-
ekspozici-
ekster-
ekzamen-
ekzempl-
ekzerc-
ekzist-
el
elektr-
elektr-
en
energi-
erar-
esper-
esplor-
esprim-
est-
estim-
eventual-
evolu-

facil-
faden-
fajr-
fak-
fakt-
faktur-
fal-
fam-
famili-
far-
fart-
feliĉ-
fenestr-
fer-
feri-
ferm-
fest-
fiks-
fil-
film-
fin-
fingr-
fiŝ-
flag-
flank-
flav-
flor-

flu-
flug-
foj-
foll-
fond-
font-
for
forges-
fork-
form-
fort-
fos-
fot-
frap-
frat-
fraŭl-
fremd-
frenez-
freŝ-
frost-
fru-
frukt-
fulm-
fum-
funkci-
fus-

gaj-
gajn-
gas-
gas-
gast-
gazet-
glaci-
glas-
glit-
grand-
gras-
gratul-
grav-
gren-
griz-
grup-
gust-
gvid-

garden-
ĝen-
ĝeneral-
ĝentil-
ĝis
ĝoj-
ĝu-
ĝust-
ha
hait-
har-
haŭt-
hav-
havent-
hejm-
hel-
help-
herb-
hier-
hier-
histori-
ho
hodiaŭ
hom-
hor-
horloĝ-
hotel-
hund-

ide-
ideal-
imag-
imit-
industri-
infan-
inform-
insekt-
insign-
instru-
insul-
inteligent-
intenc-
inter-
interes-
intern-
invit-
ir-
ja
jam
jar-
je
jen
jes
juĝ-
jun-
jup-
just-

kad-
kaf-
kaj
kajer-
kalendar-
kalkul-
kamp-
kant-
kap-
kapabl-
kapt-
kar-
karb-
kart-
kased-
kaŝ-
kat-
kaŭz-
kaz-
ke
kelk-
kilo-
kilometr-
kis-
klar-
klas-
klin-
klopod-
klub-
knab-
kol-
kolekt-
koler-
kolor-
komb-
komenc-
komerc-
komfort-
komisi-
komitat-
kompar-
kompat-
kompren-
komput-
komun-
komuni-
kon-
koncern-
kondiĉ-
konduk-
konfes-
kongres-
konkret-
konsent-
konserv-
konsider-
konsil-
konsist-
konstant-
konstru-
kontakt-
kontent-
kontraŭ
kontrol-
konven-
konvink-
kopi-
kor-
korb-
korespond-
korp-
kort-
kost-
kostum-
kovert-
kovr-
krajon-
kre-
kred-
kresk-
kri-
krom
kruel-
krur-
kudr-
kuk-
kuler-
kulp-
kultur-
kun
kupon-
kur-
kurac-
kuraĝ-
kurs-
kuŝ-
kutim-
kuz-

kvadrat-
kvalit-
kvankam
kvant-
kvazaŭ
la
labor-
lac-
lag-
lakt-
land-
lang-
lang-
larĝ-
las-
last-
laŭ
lav-
lecion-
leg-
legom-
leĝ-
lern-
lert-
leter-
lev-
liber-
libr-
lig-
lign-
lim-
lingv-
lingv-
lini-
lip-
list-
lit-
liter-
literatur-
loĝ-
lok-
long-
lud-
lum-
lun-
man-
manĝ-
manier-
mank-
mantel-
mar-
mark-
marŝ-
mastr-
maŝin-
maten-
material-
mebl-
medi-
membr-
memor-
mend-
merit-
met-
metal-
metod-
metr-
mez-
mezur-
miks-
milit-
minus-
minut-
mir-
modern-
mok-
mol-
moment-
mon-
monat-
mond-
mont-
montr-
morgaŭ
mort-
mov-
mult-
mur-
muŝ-
muze-
muzik-

nep-
nepr-
neŭtral-
nev-
nigr-
niv-
nukt-
nokt-
nom-
nomb-
nord-
normal-
not-
nov-
nu
nub-
numer-
nun
nur
obe-
objekt-
odor-
ofic-
oft-
okaz-
okcident-
okul-
okup-
ol
ole-
onkl-
opini-
or-
ord-
ordinar-
ordon-
orel-
organiz-
orient-
original-
ost-
ov-
pac-
pag-
pag-
pak-
palp-
pan-
pantal-
paper-
par-
pardon-
park-
parol-
part-
pas-
paŝ-
patr-
pec-
pen-
pend-
pens-
pent-
per
perd-
perfekt-
period-
mez-
permes-
person-
pet-
pez-
pied-
pik-
pil-
pilk-
plaĉ-
plafon-
plan-
plank-
plant-
plast-
plej
plend-
plezur-
pli
plor-
plu
plum-
plur-
plus-
pluv-
po
naci-
naĝ-
nask-
natur-
naz-
ne
nebul-
neces-
neĝ-
nek

port-
post-
postul-
poŝ-
poŝt-
pot-
pov-
praktik-
prav-
precip-
preciz-
prefer-
preĝ-
preleg-
prem-
premi-
pren-
prepar-
pres-
preskaŭ
pret-
preter
prez-
prezent-
prezid-
pri
princip-
printemp-
pro
problem-
produkt-
profund-
program-
progres-
projekt-
proksim-
promen-
promes-
propon-
prop-
propr-
proci-
prip-
publik-
pun-
punkt-
pup-
pur-
pur-
pup-
pūs-
rad-
radi-
rajt-
rakont-
rand-
rang-
rapid-
raport-
redakt-
reg-
region-
regul-
reĝ-
reklam-
rekomen-
rekt-
reli-
renkont-
respond-
resist-
revu-
rezult-
ricev-
ric-
rid-
rigard-
rilat-
rimark-
rimed-
ripet-
ripoz-
river-
rob-
roman-
romp-
rond-
roz-
rubrik-
ruĝ-
rul-
saĝ-
sak-

sal-
salon-
salt-
salut-
sam-
san-
sang-
sankt-
sat-
sav-
sci-
scienc-
se
sed
seĝ-
sek-
sekretari-
seks-
sekv-
semajn-
sen-
senc-
send-
sent-
serĉ-
seri-
serioz-
serv-
sezon-
sid-
sign-
signif-
signif-
simil-
simpl-
sinjor-
sistem-
situaci-
skatol-
skrib-
soci-
soif-
sol-
soldat-
solv-
somer-
son-
spec-
special-
spegul-
spert-
spez-
spic-
spir-
sport-
staci-
star-
stat-
stel-
strang-
strat-
streĉ-
stud-
stult-
sub
subit-
sud-
suf-
sufiĉ-
sukces-
suker-
sum-
sun-
super-
supoz-
supr-
sur
ŝaf-
ŝajn-
ŝanc-
ŝanĝ-
ŝat-
ŝerc-
ŝip-
ŝir-
ŝlos-
ŝnur-
ŝrank-
ŝtat-
ŝtel-
ŝtof-
ŝton-

ŝtrump-
ŝtup-
ŝu-
tabl-
tabul-
tag-
tamen
tas-
task-
taŭg-
te-
teatr-
tegment-
tekst-
telefon-
teler-
televi-
tem-
temp-
ten-
teori-
ter-
terur-
tim-
tir-
tond-
tra
tradici-
traduk-
traf-
trakt-
tranc-
trankvil-
trans
tre
trink-
tro
trov-
tru-
tuj
tuk-
turism-
turist-
turn-
tuŝ-
tut-
universal-
universitat-
urb-
util-
uz-

vagon-
valid-
valor-
varm-
vast-
vek-
ven-
vend-
venk-
vent-
ver-
verd-
verk-
vesper-
vest-
veter-
vetur-
viand-
vic-
vid-
vigl-
vilag-
vin-
vintr-
vir-
viŝ-
vitr-
viv-
vizaĝ-
vizi-
voĉ-
voj-
vojaĝ-
vok-
vol-
vol-
vort-
vost-
zorg-

Aldone uzeblas la oficialaj afiksoj, gramatikaj finaĵoj, korelativoj, pronomoj, tag- kaj monatomoj, numeraloj, kunmetitaj vortoj formitaj el la listigitaj elementoj, kaj la plej konataj mallongigoj.